# POR VIA DISTRO

*Nia Konkurso*

*Unua problemo* — Nombra enigmo (20 poentoj)

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 79 literoj. La ŝlosil-vortoj estas :

28-27-19-8-7-9-74-5-4-3-2-56 : nomo de eminenta esperantisto

33-10-22-14-11-57-48-49 : bela birdeto
24-15-74-18-26-36-50-51 : orientazia lando
1-71-12-13-47-41-5-20-35-34 : ruslanda urbego
55-10-63-23-16-17-18-31-32-25 : balkana lando
73-6-29-30-38-37 : parto de la vorto
53-33-36-76-75-78-57-59 : brazila mono
60-42-76-40-39-45-43-53-77 : granda lacerto
54-52-68-70-64-65-8 : amerika frukto
21-58-61-62-11 : granda blanka floro
3-46-79-67-66-23 : bonodora spicaĵo
44-25-69-2-72-15 : fidela al sia superrulo

1-79 : tre interesa araba proverbo, kiu laŭdire baziĝas sur nekalkuleble multaj spertoj.

*Dua problemo.* — En ĉiu suba frazo estas lingva eraro. Bonvolu korekti ilin. Ĉiu ĝusta korektado ricevos 2 poentojn sed estos forprenita po unu poento por ĉiu malĝusta korekto.

1 — Vi nur ĉirkaŭbrakas min, kiam vi bezonas monon !

2 — Bonvulu nin sendi informoj por nia bulteno.

3 — Ĉiuj tiuj radiaĵoj estas transporto da energio.

4 — Mi desaltis de el la glitveturilo.

5 — Via letero min tre ĝojis.

Sendu viajn respondojn antaŭ la fino de Marto al :

S-ro P. Chevalier, 19 boulevard Gabriel-Lauriol
44 — Nantes, Francujo.

AMUZAJ PROBLEMOJ (APARTAJ DE LA KONKURSO)

*Solvo de la antaŭaj problemoj :*

*En Bolonujo :* Estas dudek tri literoj en la Bolona alfabeto. Se oni uzas nur tri literojn por registri la aŭtomobilojn oni povos registri nur : 23 × 22 × 21 + 6 = 1.771 aŭtomobilojn.

Uzante kvar literojn oni povos registri : 23 × 22 × 21 × 20 + 24 = 8.855 aŭtomobilojn.

*La kvadrato :* La sumo de la nombroj de ĉiu diagonalo estas 34. Oni ne tuŝu ilin. Permutu la unuan kaj la kvaran liniojn kaj poste la duan kaj la trian. (fig. 1). Fine permutu la nombrojn de la unua kaj de la kvara, de la dua kaj de la tria kolumnoj, ĉiam ne tuŝante la nombrojn de la diagonaloj. (fig. 2).

*fig. 1*

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1 | 14 | 15 | 4 |
| 9 | 6 | 7 | 12 |
| 5 | 10 | 11 | 8 |
| 13 | 2 | 3 | 16 |

*fig. 2*

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1 | 15 | 14 | 4 |
| 12 | 6 | 7 | 9 |
| 8 | 10 | 11 | 5 |
| 13 | 3 | 2 | 16 |

*Novaj problemoj :*

*La cirklo kiu havas du centrojn :* Estu angulo AIB, la punktoj M sur IA, N sur IB, la perpendiklo MC sur IA kaj, la perpendiklo NC sur IB. La cirklo kiu pasas per M,C,N pasas ankaŭ per D sur IA kaj E sur IB. Montru ke tiu cirklo havas du centrojn. :

*La pilkoj :* Oni aĉetis 15 tenisopilkojn por iu sumo. Se ĉiu pilko kostus 20 centimojn malpli ; oni povus aĉeti 5 pliajn pilkojn. Kiu estas la prezo de ĉiu pilko ?